

psikologiaj kaj pedagogiaj aspektoj de la porpaca batalo

Prof. Genčo Pirjov

La batalo por monda paco kiel plej aktuala tasko de la nuntempo havas diversajn aspektojn, kiuj postulas partoprenon ne nur de politikistoj, ekonomiistoj, sociaj aktivuloj, sed ankaŭ de sciencistoj. Sendube, gravan lokon inter la sciencoj, kiuj havas rilaton al la problemoj de la paco, okupas ankaŭ la psikologio. Tio determiniĝas de la cirkonstanco, ke tiuj problemoj koncernas la homan bezonon de paco, ke de la formado de pozitiva aŭ negativa rilato en la konscio de la homoj al la demandoj pri milito kaj paco dependas ankaŭ ilia solvo. Konate kian grandegan laboron faras la agresemaj rondoj en la Okcidento por sugesti la ideon pri neceso kaj neevitebleco de la militoj. La t. n. „malvarma milito“ estas esence psikologia. Al ĝi oni devas kontraŭstarigi ankoraŭ pli intensan psikologian kaj edukatan laboron por la venko de la porpaca batalo.

Falsa argumento

Unu el la argumentoj, kiujn uzas la apologiistoj de la milito kaj kontraŭuloj de la paco, koncernas la aserton, ke homo estas agresema estulo kaj ke lia agresemo neeviteble kondukas al vico de konfliktoj, inter kiuj la milito estas la plej grava kaj necesa manifestaĵo.

La agresemo tamen tute ne estas universala fenomeno en la psiko de la nuntempa homo. Ĝi manifestiĝas ĉe apartaj individuoj ĉe certaj cirkonstancoj, kiuj entenas staton de subpremito. Jam estas konate al la scienco, ke ĉe la homo mankas instinktoj, kiuj determinas lian konduton, kiel tion oni observas ĉe la bestoj. Tio, kio estas instinkto ĉe la bestoj, ĉe la homoj tiom ŝanĝiĝis sub la influo de la sociaj kondiĉoj de vivado kaj edukado, ke ĝi perdis sian originan karakteron kaj ne povas esti ĉefa movilo de la konduto. Eĉ plie: en multaj okazoj sub influo de la formitaj kutimoj aŭ rezulte de formiĝintaj konvinkoj, homo povas agi sendepende, eĉ kontraŭ siaj supozeblaj instinktaj inklinoj. Tio ĉi observiĝas ekzemple en okazoj, kiam sub la

influo de modo kaj imitado la homo adoptas tiajn kutimojn kiel la tabakfumadon, konsumadon de alkoholaĵoj kaj aliaj opioj kiuj efikas kontraŭ la naturajn bezonojn de sano kaj normala vivo. Ankoraŭ pli karakterizaj estas la ekzemploj de memofero en la batalo por iu idealo aŭ por la savo de homa vivo, kiam oni neglektas la plej fortan instinktan impulson por konservo de la propra vivo.

Oni delonge refutis la biologian klarigon de la sociaj fenomenoj kaj oni ne plu povas subteni la tezon pri neevitebleco de la milito kiel rezulto de l'agresemo. Krome, eĉ tiuj psikologoj kiel ekzemple la reprezentantoj de la psikoanalizo, kiuj adoptas la superregantan rolon de la instinktaj inklinoj, konsideras, ke tiuj inklinoj povas ŝanĝiĝi kaj „sublimiĝi“ en aliajn manifestaĵojn, kiuj ne rezultas senpere el la naturaj instinktoj.

Koncepto pri humanismo

Kontraŭe al la ideo pri agresemo estas la koncepto pri humanismo. Ĝi metas en la centron de l'atento la homon, liajn rajtojn kaj bezonojn, lian ĉiuflankan disvolviĝon kaj ĉiam inspiris la plej progresemajn cerbojn en la pasinteco, movas ankaŭ nun ĉiujn, kiuj batalas por bono de la homaro. Kaj tiu ĉi bono estas neimagebla sen daŭra mondpaco. Ne povas ekzisti io alia tiel kontraŭa al la humanismo kiel la milito, en kiu neniĝas ne nur la humanaj kvalitoj de l'homoj, sed neniĝas ankaŭ ilia vivo, detruigiĝas la kondiĉoj por ilia normala ekzistado. Jen pro kio la ideo pri humanismo estas esenca psikologia kaj pedagogia premiso de la pacbatalantoj, ĝi unuigas la klopodojn de ĉiuj homoj, kiuj en sia profesia, socia kaj kreada agado strebas al paca mondo. Tiu ĉi ideo trovas esprimon en diversaj internaciaj renkontiĝoj de sciencistoj, verkistoj, sindikataj agantoj, ĝi manifestiĝis ankaŭ en la Monda Porpaca Parlamento de la Popoloj antaŭ nelonge okazinta en Sofia.

Graveco de la konfido

Intime interligitaj kun la ideo pri humanismo troviĝas ankaŭ aliaj psikologiaj premisoj de la pacbatalo. Tio estas la konfido kiel bazo de l'internaciaj kaj interŝtataj rilatoj. Ĝi estas sub-

Genčo Pirjov estas membro de Bulgara Akademio de la Sciencoj, profesoro en la Sofia Universitato „Kliment Ohridski“, ĉefredaktoro de Bulgara revuo „Psihologija“ (Psikologio), membro de Monda Asocio de Edukistoj por Paco, membro de Monda Federacio por Edukada Esploro.
Prof. Genčo Pirjov estas granda amiko de Esperanto.



Belgio

LETERO DE BELGA MINLABORISTO

Al la Samarkand-a klubo de internacia amikeco "Esperanto" venis letero el la belga urbo Maac-mexelen.

„Karaj kamaradoj! La 9-an de decembro ni partoprenis en granda internacia protesta demonstracio kontraŭ la planoj de NATO pri produktado kaj dislokado de usonaj nukleo-raketoj en Okcidenta Eŭropo. La laboruloj en la tuta mondo ne plu volas paciĝi kun tio kaj ĉiam pli kaj pli ofte efektivas tiajn demonstraciojn. La kapitalistoj nin nomas ordinaraj homoj, kaj la ordinaraj homoj ne volas militi, ili volas esti amikoj kun la popoloj de la tuta mondo. Kaj tiaj homoj estas multegaj. Ni kredas, ke la homaro povas eviti novan militon, sed tiucele oni devas fortikigi la solidarecon kun la laborantoj el la tuta mondo. Ni scias, ke Sovet-Unio faras

fosata de la vetarmado kaj ankoraŭ plie fortiĝas ĉe tiu ĉi konkurado. La konfido inter la popoloj estas subfosata de la falsa informado, precipe de la kalumniaj informoj, kiuj disvastiĝas de tiuj, kiuj konscie laboras kontraŭ la paco. Male: ĝi subteniĝas kaj fortikiĝas de la ebloj de reciproka konado de la homoj el diversaj landoj. Esprimplena ekzemplo pri tio estis la Internacia Infanasembleo „Standardo de Paco“, organizita en Bulgario.

Lige kun tio oni devas emfazi la signifon de la reciprokaj toleremo kaj preteco por dialogo inter la landoj eĉ tiam, kiam ekzistas malsamecoj en ilia sociordo. La ideo pri paca kunekzistado inter la ŝtatoj kun malsamaj vivkondiĉoj, kies esprimo estis la Fina Akto de la Konferenco en Helsinki, estas manifestado de spirito de konfido kaj toleremo. Sed samtempe ni estas atestantoj ankaŭ de strebado de iuj gvidaj fortoj neniigi tiun ĉi spiriton. Necesas sistemaj klopodoj de ĉiuj homoj de bona volo por ke tiuj ĉi streboj paraliziĝu. La monda pacmovado, tiel same multe da aliaj organizaĵoj, kiuj laboras tiudirekte, kaŝas grandajn eblojn, ĉar en ili partoprenas homoj de diversaj popoloj, diversaj religioj kaj profesioj, unuiĝintaj de unu nobla celo — la paco.

ĉion eblan por konservi la paco. La komunikiloj por amasinformado en Belgio, same kiel en aliaj kapitalismaj landoj, konstante disvastigas mensogojn pri USSR. Antaŭ ne longe ni organizis ekspozicion de afiŝoj kaj libroj pri Sovet-Unio. Tiu ekspozicio rakontas la veron pri via lando, pri la grandiozaj atingoj de la soveta popolo. . .“

Tiun leteron sendis belga minlaboristo Franc Zvar. Ĝi estas resonado de publikaĵo en internacia revuo de l'esperantistoj, resonado de alvoko de la membroj de Samarkand-a Klubo de l'Internacia Amikeco „Esperanto“, ke oni sendu al ili materialojn pri la ekspozicio, kiu rakontas pri la batalo por paco en la diversaj landoj. En sia letero la belgo enmetis fotokopiojn de afiŝoj kaj protestalvokoj kontraŭ la vetarmado. Franc Zvaar rakontis ankaŭ pri la Tago memore al la soveta soldatoj pereintaj sur belga tero en la dua mondmilito — tago, kiu okazis en tiu urbo.

A. Jonesov

USSR

PACBATALANTOJ SKRIBAS

En la internacia klubo „Esperanto“ ĉe la Samarkand'a urba komitato de la komsomolo venis letero el Hanover, skribita de Gerd Neusenger, unu el la gvidantoj de la Germana Pacbatala Unuiĝo — plej granda publika organizo de la pac-amikoj en Federacia Respubliko Germanio.

„Karaj amikoj, organizantoj de la ekspozicio de pacbatalantoj — skribas Gerd Neusenger laŭ

En tiuj ĉi organizoj ne nur efektiviĝas la dialogo inter la partoprenantoj en ili, sed ankaŭ kreiĝis ebloj kaj aktiva agado absolute necesa por forigo de la baroj sur la vojo de sereniĝo en la internaciaj rilatoj kaj de paco.

Por tio povas kontribui ankaŭ ĉiuj institucioj de edukado kaj de amasa komunikado. La lernejoj de ĉiuj gradoj kaj specoj, precipe la mezaj kaj la superaj lernejoj, havas plej respondecan rolon por la edukado de la junaj generacioj en la apartaj landoj en spirito de internacia kompreniĝo. Internaciaj tendaroj, korespondado inter infanoj kaj junuloj el diversaj landoj, ilia partopreno en diversaj renkontiĝoj de la speco de festivaloj, asembleoj k. a. kontribuas multe tiurilate. Ne malgrandan rolon ludas interalie ankaŭ kontaktoj, korespondado kaj reciprokaj vizitoj, kiuj efektiviĝas per Esperanto kaj la agado de MEM, kies moto estas „Esperanto en servo de paco“. Ne estas malgranda la rolo ankaŭ de literaturo, de arto, televido, radio, gazetaro. La granda afero de la paco postulas kunordigitan laboron en ĉiuj landoj kaj partoprenon de ĉiuj konsciaj homoj.

El la bulgara: Dimitro Haĝiev

komisio de la Germana Pacunuiĝo — akceptu niajn plej korajn bondezirojn.

La pacmovado en nia lando devigas la registaron de FRG fari praktikajn paŝojn por rezigni pri la danĝera kaj multtekosta politiko de vetarmado, pri realigo de politiko de malarmado. Por la popoloj de la Tero ekzistas nenio pli kara ol la paco. . .“

En la pasinta jaro la esperantistoj organizis ekspozicion, ĉe kiu estis prezentitaj afiŝoj kaj pentraĵoj el diversaj landoj. Iia temo estis la batalo por paco. Informoj pri tiu ĉi ekspozicio estis publikigitaj en diversaj alilandaj eldonaĵoj. La letero el Hannover estas resono de tiu evento.

GASTOJ EL FRANCO

Geedzoj Boni, membroj de la Pariza Esperanto-klubo, vizitis Samarkand-an filion de l'Uzbekia asocio de amikeco kaj kulturaj kontaktoj kun alilando.

Aktivuloj de la Samarkand'a urba klubo por internacia amikeco „Esperanto“ konigis al la gastoj la atingojn de la distrikto kaj la respubliko en diversaj sferoj de nacia ekonomio. Ili rakontis pri la historio de l'Esperanto-movado en Uzbekio. Dum la interparolo oni esprimis ambaŭflanke deziron starigi konstantajn amikajn kontaktojn inter la esperanto-kluboj en Parizo kaj Samarkand.

Adiaŭante, sinjorino Boni diris:

— Ni estas feliĉaj, ke ni vizitis vian belegan landon. Ni por ĉiam rememoros ankaŭ la tagojn pasigitajn en Samarkand. Via urbo estas mirinde bela, kaj ni esperas denove veni tien ĉi.

La francaj turistoj pririgardis la vidindaĵojn de la urbo, vizitis la distriktan bibliotekon „A. S. Puŝkin“.

A. Jonesov

(La lastaj du materialoj pri la Samarkanda klubo estas tradukitaj de Asen Grigorov el tiea ruslingva ĵurnalo „Vojo de Lenin“)

INTERNACIA AMIKECO

Novembre 1980 en urbo Ternopol (Ukrainio) estas fondita Esperanto-Societo de Internacia Amikeco „Amikeco“. Por montri al ne-esperantistoj, ke Esperanto taŭgas por internaciaj ligoj ni petas ĉiujn Esperanto-organizaĵojn kaj unuopajn esperantistojn en la tuta mondo sendi al ni leterojn aŭ poŝtkartojn kun bondeziroj kaj proponoj pri konkretaj ligej. La alvenintajn poŝtendaĵojn ni uzos kiel propagandmaterialon por Esperanto. Ĉiu letero aŭ karto estos respondita. Nia adreso: Esperanto-societo „Amikeco“, 282001 Ternopol, p. k. 83 — USSR

MEMORE AL K. GUSEV

En februaro ĉi-jara okazis solena kunveno de Moskva Internacia Esperanto-Klubo (MIEK), dediĉita al la memoro de nia eminenta Esperanto-poeto Konstantin Gusev.

En la granda salono de la Kulturpalaco de

Metrostroj (konstruantoj de la Moskva metroo) ĉeestis ĉirkaŭ 200 samideanoj kaj amikoj de Gusev. Krom tio estis: Ljudmila Guseva (lia vidvino) kaj Viktor K. Gusev (lia filo), ankoraŭ multaj liaj kunlaborantoj en gazeto „Pravda“, kie laboris la forpasinto.

Kun rememoroj pri K. M. Gusev elpaŝis: kritikisto Ergon Osetrov, kiu rakontis pri la ekstreme alta nivelo de poezio, kiel originala tiel traduka, de Gusev. Kelkaj liaj versaĵoj estis cititaj.

Pri la granda poresperanta laboro de K. M. Gusev rakontis V. V. Samodaj, kiam ili kune efektivigis eldonojn de kantoj kaj poeziaĵoj en Esperanto.

La poeto kaj amiko de Gusev — Nik. D. Timakov, kiu laboris kun li en la eldonejo de „Pravda“ — rakontis pri la eminenta kapableco kaj granda laboremo de K. M. Gusev, kiu talente kaj altnivele kreis proprajn poeziaĵojn kaj faris tradukojn ĉu rusen aŭ el la rusa lingvo.

La vidvino de K. M. Gusev dankis la ĉeestantojn pro la tiom varma kaj kora honorigo de la hela memoro de ŝia edzo, precipe dankis la estraron de MIEK pro la okazinta aranĝo. En la vestiblo de l'halo estis organizita ekspozicio de fotoj el la vivo kaj agado de Gusev, libroj kun liaj verkoj kaj revuoj kun liaj versaĵoj kaj artikoloj.

Fedor Kulagin

Hispanio

La urbestroj de Torrejón de Ardoz, Zaragoza kaj Rota, petis la reĝon hispanan, ke oni konstruu rifuĝejojn kontraŭ la atombombo en siaj respektivaj urboj, antaŭ la danĝero, kiun prezentas vivi apud la usonaj militbazoj. Multe pli ekde kiam S-ro Reagan venkis en la voĉdonado.

(Publikigita en „El Periódico“ el la bulteno de MEA „Anton Balague“)

Bulgario

La esperantistoj en urbeto Godeĉ organizis tuturban kunvenon por la urbanoj je temo: „Esperanto kaj la batalo por paco“. La kunveno akceptis rezolucion kontraŭ la agreseman politikon de Usono kaj NATO, kontraŭ la vetarmadon kaj instalaĵojn de novaj amasmortigiloj en Eŭropo. Oni deklaras, ke aktive partoprenos en la plenumo de la Ĉarto akceptita de la Porpaca Mondparlamento de la Popoloj. Oni insistas pri ĉesigo de produktado de nukleaj kaj aliaj amasmortigiloj, redukto de militbuĝetoj, ratifiko de SALT-II.

Juri Karen

La muskolulo
ĉe l'pafbudo krie anoncanta
"Nur eniirru gesinjoroj!"
estis atom-generalo
inkognita. Supozantoj malabundis.
Konfidence palpebrumis li "Silentu,
se vi scias". Mi, sciante,
ne malhelpis lian trukon.

Kaj jen — sur tankoj el fatrasa lado
tuj ili veturas kantobruie,
fulmotondron post la dorso.
„Jam scipovas ni la domojn ruinigi.
Jam scipovas ni per homoj ŝargi
kvazaŭ per grenfaskoj
veturilojn de aflikto superplenajn.
Jam scipovas ni kavetojn variolajn fari
sur la vangoj de l'planedo.
Ni jam scias kiel nin protezoj faras plaĉaj,
kiam estos ni senbrakaj kaj senkruraj.
La malvarmon de la tomb' jam konas ni. . .”
Pafbrue ili celas trans la horizonton,
pri milito kantojn kantas
lado-soldatetoj ĉi-momente

en vitrino.

La muskolulo ĉe l'pafbudo
krie anoncanta "Nur eniirru gesinjoroj!"
per siaj okuloj la pejzaĝon
facile ŝultrenjetis kvazaŭ ĉaspafilon.
Per rigardo radarsimile esploranta
ekpatrolis li tra l'regiono.
Ĉu oni povas detrui? Kiom kostos?
Kaj ĉu restos por li sendanĝere
kiam la tero kiel pomo
per tranĉilo disigita
en terura uragano
sangos?

Jen kiel polvokovriĝas urboj ŝtonaj.
Anstataŭ estaĵojn oni trovas
sole torsojn de statuoj disrompitaj.
Jen minace superstaras nur silenta ŝtono,
ŝtonestaĵoj jen konsumas
en la pejzaĝo silenta
nur ŝtonpanon
kun ŝtonpeco en la brusto.
Superstaras ŝtonminace ŝton'-silent'.
Oni pasas en hororo
preter domoj nevideblaj
kun seruroj senŝlosilaj
ombrojn timante (ĉar ĉi tie
eĉ la morto mortis).
Kia feliĉo, ke en verda malproksimo
oni aŭdas eskplodi nur petardojn
de infana rido.

Ĉe la pafbudo krie anoncante
"Nur eniirru gesinjoroj!"
palpebrumis li. "Nur plu silentu".
Fakte estis li atoma generalo.
Jen la avideco en okuloj de la spino.
Fakosperte li observas la skeleton
de l'neestonta civilizo.
Bruas paŝoj de nenie ĝis nenio.
Aŭdas mi diablondiradi,
moki vian torturadon.
Dudek sep dolaroj. . .

Kaj subite ĉio tenebriĝis,
ŝajne ĉio dormas en kvieto.

Vi ĉiuj dormantoj
en Vjetnamo, en Koreo,
kaj vi herboserpentoj, kaj vi generaloj
kun monoklo surokule
kiuj vin ŝajnigas providenco,

sciu

precize je la sepa de eŭropa tempo
mi naskiĝis
en la verdo de betuloj kaj de fagoj.
Ploras mi pri ĉi militoj viaj.
Li vokis kaj vokis "Eniirru nur".

Estis kermeso.
Ĉe la pafbudo — pafkrakoj.
Ne!

Se salvoj,
do nur tiuj de l'aŭtuna foliar' koloroj.
Se eksplodoj —
do nur tiuj de likoperdoj;
kaj se pendumitoj —
do nur groteskaj pendaĵoj

de strobiloj.

Konstruos ni. Kaj ĝuste tie ĉi
en jena region'. Sur jena
deklivo sunoriĉa.
Nubetoj — kvazaŭ aro da ranidoj
svarmantaj vigle.
Papilion ni vokos kaj petolan herbon
kaj ventospikon plantos ni sur teramasoj,
por ke neniun timu nin viziti
en la krepusk' violkolora.
Al mi sagace palpebrumis li, ke mi silentu
se scias mi,
ke estas li atoma generalo

inkognita.

Mi tion sciis ja
eĉ tro, tro bone.
Verŝajne io ne konformis en kalkuloj liaj.
Verŝajne tion trovis li tro multekosta.
Kredeble ankaŭ lia kapo estis ne senriska.
Eĉ eble tial, ĉar

kermeso estis, estis sunvetero.

Al mi li kaŝmalice palpebrumis
ke mi silentu, ke mi ne parolu.
Li krianoncis plue "Nur eniirru gesinjoroj!
Nur eniirru!"
Estis kermeso.
Pafarkoj ĉe l'pafbudo,
mi diru, trafoj akurataj.
Mi senzorgiĝis

ankaŭ pri vi.

En verda malproksimo
petardoj eksplodadis.
Ĉifoje nur petardoj
de infana rido.

El la ĉeĥa: Valda Vlna:

Glosoj:

fatraso — ne plu uzablaj senvaloraj elĵetaĵoj
tenebro — profunda mallumo
likoperdo — polvofungo

ekumena voĉo de paco

FR Germanio. La 15. 11. 1280 mortis en Kolonjo (Köln) sankta Alberto la Granda, natursciencisto, eklezia instruisto, havanta la talenton akordigadi malamikajn homojn eĉ regnojn. . . Honore al 700-jara datreveno de lia morto papo Johano Paulo la Dua vizitis lian tombon en Kolonjo, kie dum subĉiela Diservo en flughaveno li diris: „La epoko de sankta Alberto havis siajn problemojn, ni havas problemojn aliajn. . . Sed kelkaj efikaj rimedoj por ilia pli facila solvado restas la samaj: reciproka pardoniĝo, ŝato kaj amovoj al perfekteco kaj paco.“

Post Kolonjo li vizitis ankaŭ urbojn Bühl, Bonn, Osnabrück, Mainz, Fulda, Alt-Ötting kaj München. Li faris multajn paroladojn je plej variaj temoj, el kiuj internacie la plej grava estis la parolado en Mainz pri laboro kaj paco.

En ĝi la papo memorigis pri episkopo Keppler, entombigita en Mainz, citante lian eldiron: „Laboro ne devas esti ombrita per la ombroj de ekspluatado, maljusteco, humiligado, malamo. La ĉefa celo de laboro estas homo. Ĉiu homo povu partopreni ĝin kaj ricevi justan rekompencan por ĝi. Ju pli ni sukcesos redukti produktadon de malutilaj iloj, des pli ĉies kvoto estos pli granda, kaj male. Plue necesas krei tian socian ordon en la tuta mondo, kiu forigus diferencojn inter riĉuloj kaj malriĉuloj — ne nur inter unuopuloj, sed eĉ inter landoj kaj tutaj kontinentoj.“

Plua problemo estas paco! Por sekurigi ĝin, necesas serĉi solvojn kun ĉiuj homoj de bona volo en la tuta mondo! Memorcitante la 2-an mondmiliton, li apelaciis je konscienco al la ĉeestantoj: faru ĉion, ke niaj infanoj kaj nepoj ion similan ne plu travivu — kie ajn en la mondo. Necesas batali kontraŭ imperiismo, koloniismo, ekspluatado kaj agreso! Plenumu profetaĵojn de profeto Malahi: „Super ĉiuj homoj sur la tuta Tero leviĝu suno de justeco! Ĝiaj radioj trape-netru nian tutan vivon!“

FR Germanio — Zimbabve. La direktoro de l'eksterlanda fako de la okcidentgermana Karito transdonis en Salisburo — ĉefurbo de Zimbabve — al la arkiepiskopo Patrik Chakaip, sumon de 800 000 markoj, nutraĵojn kaj urĝe necesajn industriaĵojn. La donaco estas destinita por renovigo de la lando kaj normaligo de la vivo de rifuĝintoj.

Francio. Episkopo de urbo Saint-Denis vizitis fabrikan de firmao Dufour, okupitan de la fino de julio 1980 far la 730 laboristoj, defendantaj ĝin kontraŭ preparata likvido. La episkopo proklamis: „La silentanta fabriko, kiel la via, estas trista kaj nemorala afero. “Li alvokis la laboristojn

fari ĉion, por ke kristanoj en la tuta departemento subtenu ilian batalon por okupateco kaj pli granda sociala justeco.

Britio. La arkiepiskopo de Canterbury, primaso Robert Runcie, alvokis anglikanojn kaj katolikojn al komuna pentofaro en la tempospaco antaŭ la vizito de papo Johano Paulo 2-a en Britio, okazonta en jaro 1982, cele bedaŭri kaj reĝustigi reciprokajn maljustaĵojn, faritajn en pasintaj jarcentoj.

Aŭstralio. La Aŭstralia Katolika Helpejo (Australian Catholic Relief) asignis pasintjare pli ol milionon da dolaroj prospere al la popoloj de Hindujo kaj kelkaj aliaj aziaj landoj. La aŭstralia episkopa konferenco konstatis, ke temas nur pri provizora solvo, akcentante la neceson ĝisfunde ŝanĝi la rilaton inter riĉuloj kaj malriĉuloj en la mondo. Devo de kristanoj estas ekkoni la kaŭzojn de maljusteco, kondukantaj al malriĉeco, malsato, subpremo kaj ĝenerala malplibonigado de vivo de milionoj da homoj.

Ĉeĥoslovakio. „Aktivado de kristanoj por la paco“ estis temo de seminario, okazinta 4. 12. 1980 en urbo Brno. Partoprenis ĝin pli ol 200 delegitoj de 15 membro-eklezioj de la Regiona Unuiĝo de la Kristana Packonferenco (KPK) en ĈSSR. La ĝenerala sekretario de KPK D-ro L. Mirejovský akcentis, ke la ĉefa tasko en la nuna streĉita internacia situacio estas pliprofundigi la kunlaboron kun ĉiuj progresemaj fortoj en la tuta mondo por haltigi la vetarmadon. Tiucele estis sendita letero ankaŭ al la Mondkonsilantaro de Ekzlezioj en Genevo.

Vatikano. La 2. 12. 1980 papo Johano Paŭlo 2-a eldonis sian duan enciklikon pri „Dia mizerikordo“, certgrade daŭrigantan lian unuan enciklikon „Savanto de la homo“, en kiu estas jenaj ĉefaj, daŭre aktualaj ideoj: „La nunan homon ĉiam pli kaj pli minacas tio, kion li mem produktas — rezultoj de laboro de liaj propraj manoj. Homo ĉiam pli vivas en timo, ke la rezultoj de lia laboro turniĝos kontraŭ lin mem. . . Ni ĉiuj scias, ke regionoj de mizero kaj malsato sur nia Tero povus esti ĝi tre rapide fruktodonantaj, se enormaj elspezoj por armado, servantaj al morto, estus disponigitaj por rimedoj, prosperigantaj al vivo. . . La eklezio postulas nome de Dio kaj homo: Ne murdu! Ne preparu al homoj pereigon kaj ekstermon, pensu pri viaj fratoj, suferantaj pro malsato kaj mizero. Estimu la dignon kaj liberecon de ĉiu homo!“

En sia novjara prediko papo Johano Paŭlo la Dua diris, ke la homaro — arde sopiranta paco — konscias la danĝerojn de la febraj militpreparoj, minacantaj la ekziston de la popolo kaj instigis ĉiujn registarojn: „UNO proklamis jaron 1981 „Internacia Jaro de Invalidoj“. Utiligu la rimedojn, ĝis nun senceferatajn al freneza armado, por pli noblaj celoj: helpejo al malsatantoj, malsanuloj, invalidoj kaj suferantoj en la tuta mondo.“

Ĉeĥoslovakio — Japanio. Delegacio de japana budhana pacmovado Sangha vizitis en januaro 1981 laŭ invito de la Kristana Packonferenco

Ĉeĥoslovakion, kie ĝi renkontiĝis kun reprezentantoj de la enlanda eklezia vivo, ĉeĥoslovaka pac-komitato, eĉ ŝtataj organoj. La delegacion gvidis estro de budhana monaĥejo en Hiroŝima Acuŝi Kawagiŝi, kiu atentigis pri danĝero de kreskantaj militarismaj tendencoj en Japanio, grave minacantaj la pacon ne nur en Azio, sed en la tuta mondo.

La ĉefa senco de la „pacmarŝo“ sub devizo „Ne plu Hiroŝima“ — farita en multaj eŭropaj landoj de septembro 1980 ĝis aprilo 1981 — estas averti kontraŭ minacoj de nova, nuklea milito kaj konatiĝi kun la vivo en la socialismaj landoj. La japanaj budhanoj mensciis, ke la japanaj amas-komunikiloj raportas pri tiuj ĉi landoj sub influo de psikologio de la malvarma milito, konfirmis, ke ili povis konvinkiĝi pri la paca politiko de la socialismaj landoj kaj informis pri agoj por malarmado kaj paco, aranĝataj de la japana budhana pacmovado Sangha.

Britio. La brita eklezia konsilantaro, kuniganta reprezentantojn de diversaj kristanaj religioj, kondamnis dum sia kunsido en Londono la febran armadon, dislokadon de novaj usonaj nukleraketoj en okcidenta Eŭropo, la preparatan novan ekipadon de britaj submarŝipoj per usonaj raketoj Trident, kio ne akordiĝas kun la faktaj interesoj de Britio. La ferma rezolucio instigas ĉiujn kristanojn al ankoraŭ pli intensa aktivado por malarmado kaj novaj iniciatoj cele al la tutmonda paco.

Usono. Kvarcent usonaj ekleziuloj, inkluzive kelkajn episkopojn, alvokis komence de 1981 la registaron limigi helpon al Izraelio, ĉar ĝi malrespektas la elementajn homajn rajtojn. En la mesaĝo la subskribintoj instigis la izraelian kaj la usonan registarojn rekoni la rajtojn de la palestinanoj je memdestino, inkluzive la rajton krei propran ŝtaton.

Italio. La ĉefepiskopo de Torino, kardinalo Anastazio Ballestrero, kontraŭstaris maldungadon de laboristoj de la firmao FIAT, postulante materialan helpon al ili. En preĝejo de la Redemptoro (Jesuo, rim. de la red.), li en Diserva prediko kondamnis ĉiujn formojn de individuisma egoismo, ĉar ĝi alportas amarajn fruktojn. Dum la Diservo estis kolektitaj donacoj por la plej suferantaj familianoj de maldungitoj de FIAT.

Usono. La jara laborkunveno de 250 nordamerikaj episkopoj en Vaŝingtono pritraktis kiel sian ĉefan temon la animzorgan leteron pri kunlaboro de la kristanoj kun marksistoj. La kunveno, gvidita de la prezidanto de la tutŝtata episkopa konferenco, ĉefepiskopo John Quinn el San Francisko — akcentis la gravecon serĉi bazon por tiu ĉi komuna kunlaboro, ebla precipe en sferoj de forigado de mizero kaj edukado al sociala justeco en la tuta mondo.

Ĉeĥoslovakio. En la tagoj de 26. I. — 30. I. 1981 okazis en la ĉefurbo Praha kunsido de la internacia sekretariato de la Kristana packonferenco, kiu starigis ĉefajn taskojn de tiu ĉi internacia organizo por la jaro 1981, precipe: subteni ĉiujn internaciajn penojn celantajn mal-

ebligi la minacantan militkatastrofon kaj savi la vivon sur nia planedo Tero.

Francio. Okaze de la Novjara „Tago de Paco“, la Pariza ĉefepiskopo François Marty proklamis: „La milito ne estas neevitebla, ni ne rajtas konstante uzi ĝin kiel kutiman solvilon de konfliktoj. . . Batali por paco signifas inter alie ankaŭ serioze intenci ŝanĝojn en divido de la mondriĉaĵoj.“

J. K.



MALSATAJ INFANOJ EN LA MONDO

El 122 milionoj da infanoj, naskitaj en 1979, jam forpasis pli ol 12 milionoj — informas la jarraporto de UNICEF (Fondusoj de Unuigintaj Nacioj Defende al la Infanoj). La raporto konstatas, ke la popoloj de la „Tria mondo“ faras grandajn klopodojn por sia propra evoluigo. Tamen malgraŭ ĉio farata, iliaj problemoj estas tiel komplikaj kaj akraj, ke tiuj klopodoj estas tute malsufiĉaj. Precipe malfacilegaj estas la problemoj en Afriko kie la duono de la infanaro suferas pro nesufiĉa nutrado kaj kvarono el ĉiuj mortas antaŭ ol atingi aĝon de kvin jaroj. En iuj afrikaj landoj tiu procento ampleksas la duonon de la infanaro.

Entute en la mondo pro nesufiĉa nutrado suferas 450 milionoj da homoj, sed ĝis la jaro 2000 tiu nombro pli kreskos ĉefe pro la neegala pli-grandigo de la nutraĵproduktoj. Ege malgrandiĝas la nutraĵo en la landoj sude de Saharo, kie la malsufiĉo ekhavis dramatan karakteron.

La malsufiĉa nutrado, notas la raporto, pligraviĝas ankaŭ pro la malpurigo de la akvaro rezulte de ĝenerala malpurigo de la vivmedio kaj pro infektaj malsanoj. Tial la sanstato de la plejmulto de la popoloj el la „Tria mondo“ estas katastrofa. La buĝetitaj sumoj, kiujn tiuj popoloj povas apartigi por sia sanprotekto, estas ege malsufiĉaj. Ekzemple, en Afriko kaj Azio la jarbuĝetitaj paragrafoj pri tiuj bezonoj ne superas kvin dolarojn popersono dum unu jaro. Krome, la tri kvaronoj de tiuj sumoj estas forkonsumitaj de la multekostaj medicinaj servoj.

UNICEF deziras akcentigi ankaŭ la prizorgon pri la sanstato de patrinoj. Nun, emfazas la raporto, ĉiujare pli ol duonmiliono da virinoj el Afriko kaj Azio mortas dum naskado.

La taskoj realigendaj en tiu sfero estas grandegaj. Antaŭ ĉio cetera, nur por kontentigo de la plej gravaj bezonoj de „Tria mondo“ necesas 12—20 miliardoj da dolaroj ĉiujare dum la sekvonta dudekjara periodo. Tiu sumo ne estas neglektebla, sed tamen oni povus apartigi ĝin el la buĝetoj de la grandaj nacioj, ĉar ĝi prezentas nur dusemajnan elspezon de monrimedoj por la ĉiujare kreskanta monda vetarmado.

N. A.

mi kaj miaj KUNIKLOJ

En la korto de mia hejmo estas loko destinita por la kunikloj. Ĝi estas kvazaŭ kaĝo, kiu siavice estas dividita en kelkajn partojn. Kompreneble, mi bredas kuniklojn, kiuj verŝajne estas feliĉaj en tiuj kaĝetoj. Ofte mi malfermas ĉiujn pordojn ekzistantajn en la granda kaĝo kaj la kunikloj povas kuradi laŭvole interne de sia granda hejmo, kvazaŭ ili estus liberaj. La malfeliĉaj kunikloj post nelonga tempo konstatas, ke ili estas daŭre enkaĝigitaj.

Strange, sed miaj kunikloj kaj mi havas ion komunan, tion, ke ni ne estas liberaj. Vero estas, ke mi troviĝas nek en kaĝo, nek en karcerio. Mi jam povas iri de unu loko al alia, kun iuj esceptoj, kiujn mi ne intencas analizi ĉi tie. Sed sendepende de tiuj esceptoj, mi ja estas tute libera, same kiel miaj kunikloj en sia kaĝo. La pordoj estas malfermitaj por mi. Se mi ne deziras vivi en ĉi tiu urbo kun relativa rapideco mi povas iri alian kaj tiun ŝanĝon mi povas realigi kun relativa libereco, kiel miaj kunikloj en sia kaĝo. La problemo estas, ke post kurado de unu loko al alia, proprasperte mi venas al la konkludo, ke mia situacio estas la sama. Nenio ŝanĝiĝis en mia vivo. Mi troviĝas interne, ne de kaĝo, tio parenteze estas evidenta, sed de socia sistemo, el kiu mi ne povas eskapi.

Ĉiumatene mi alportas la manĝaĵon al miaj kunikloj. Ili estas feliĉaj, ili kuras post mi. Tuj kiam mi metas la grajnon en la manĝujon, ili ekmanĝas. Jes, tiusence, ankaŭ mi havas ion komunan kun miaj kunikloj. Mi daŭre iras post tiu aŭ alia sinjoro, por ke li donu, ebligu al mi laboron, per kiu mi povos atingi, aĉeti miajn manĝaĵojn. Miaj kunikloj pacience atendas interne de sia kaĝo mian alvenon. Pacience mi atendas la alvenon de neniuj, kiu helpos min. Miaj kunikloj ne laboras, sed ili ja manĝas. Mi ofertas mian laborkapablon interŝanĝe de manĝaĵoj kaj aliaj bezonaĵoj de la ĉiutaga vivo, sed neniuj atentis pri mi. Mi eĉ pensas, ke miaj kunikloj estas pli feliĉaj ol mi kaj miaj familiaj. En la nomo de la libero, mi jam povas iri de unu loko al alia de ĉi tiu granda kaĝo, kiu estas nia socio. Sed la rezulto estas la sama. La problemo ne solviĝas. Kion mi devas fari? La respondo mi eltiras el la vivo de miaj kunikloj. Jen, kiam mi pro iu kaŭzo, prokrastas la alporton de la grajno, ili manĝas lignon, aŭ kion ajn troveblan en sia kaĝo. Mi estas certa, ke se ili ne ricevus sian manĝaĵon ili mortus pro malsato. La ekzemplo estas aplikebla ankaŭ por

mi. Mi ja devas morti pro malsato, aŭ mi devas apliki rimedojn por eviti tiun finan solvon. Mi povas almozi, ŝteli aŭ uzi kiun ajn formon eksterleĝan, sed ĉiam interne de ĉi tiu granda kaĝo, kiu estas nia socio. Estas vero, ke miaj kunikloj ne elektis tiun loĝlokon, estas mi, kiu metis ilin tien. Ankaŭ ne mi elektis ĉi tiun sociordon. Mi jam naskiĝis en ĉi tiu socia situacio. Miaj kunikloj konstante provas eskapi, sed ili ne sukcesas. Same okazas al mi, tial ke mi daŭre serĉas alian sociordon, sed vane, mi ne kapablas realigi miajn dezirojn. Ankaŭ estas vero, ke miaj kunikloj ne posedas la kapablon intelektan por organiziĝi kaj ŝanĝi sian situacion. Mi jes, mi jam povas tion fari, sed la unua kondiĉo estas, ke mi devas utiligi aliajn homojn miaprofite. Tiu estas la unika vojo: se mi deziras eliri de ĉi tiu granda kaĝo, tiam mi devus ekspluate submeti aliajn homojn. Mia konscio tion ne permesas al mi. Tiusence oni povas konstati, ke ni homoj estas perfidaj al ni mem. Almenaŭ miaj kunikloj estas pli honestaj, ili ne konas tiom altan gradon de perfideco.

Ankoraŭ estas alia vojo por eskapi de nia sociordo. Tiu vojo estas la unuiĝo de ĉiuj konsciaj homoj kaj krei pli justan socion. Sed en ĉi tiu tereno, la „bredistoj” de la homoj establis tiel bone organizitan kontrolon, ke forkuri per unuiĝo el ilia sistemo estas tre malfacile. Ili jam disponas pri koncernaj „venenoj” por putrigi la homojn kaj krei kondiĉojn necesajn por ke daŭre ili estu la „bredistoj”, la mastroj.

Fine venas la destino de ĉiu vivanta estaĵo: la morto. Jes, pri la vivo de miaj kunikloj mi estas la mastro. Estas mi kiu decidas, kiu devas morti. Ili havas nenian decidon tiurilate. Ni homoj forprenas la vivon de ĉiu vivanta estaĵo: bestoj, fiŝoj, insektoj, plantoj. . . kaj eĉ la vivon de niaj samspecianoj. Ankaŭ en ĉi tiu aspekto la vivoj de miaj kunikloj iomete similas al la niaj. Kiam ni maljuniĝas kaj niaj fortoj fizikaj kaj intelektaj ne plu interesas niajn „bredistojn” aŭ mastrojn, oni ĵetas nin al angulo de ĉi tiu preparolita kaĝo, kun malmultaj vivorimedoj, por ke iom post iom ni mortu. Tamen, feliĉa estas tiu, kiu fine alvenas al tiu situacio kompatinda, ĉar estas alia momento pli grava en nia enkaĝigita vivo, temas kiam niaj „bredistoj” konsideras necesa la eksplodon de milito, ĉar pere de ĝi ili atingos grandegajn profitojn. Tiam ni estas sendataj kiel kunikloj al la morto, en la nomo de mi ne scias kiaj etikaj valoroj, ĉar fakte post la milito tiu, kiu restas vivanta, denove konstatas, ke li daŭre troviĝas en la granda kaĝo. Almenaŭ miaj kunikloj neniam sendas siajn kamaradojn al morto.

Luis Serrano Pèrez



Kiu lingvo estas pli internacia — Esperanto au Latino.

Responde al B. Golden

Krom detala, tro detala, rebato de mia hipotezo (vidu „Paco“ 6/1980) pri parenceco inter nuboj kaj nobelo (ĉar mi ja faris nur hipotezojn, kaj ne dekretis elkatedre kiel mia eminenta kontraŭulo), la tuta argumentado de s-ro Golden estas, ke mia tezo eksmodiĝis (ĉar scienca teorio, ĉu ne, devas sekvi modon, kiel robo aŭ kravato). Nu, tion mi tute konfesas.

Mi citis kontroleblajn faktojn: en ĉiuj lingvoj, kiujn mi povis konsulti, la vortoj por *patro, patri-no, mi, ci*, estas similaj (ne „supraĵe“ similaj). Mi povus citi aliajn vortojn (ekzemple, la vorton por *sas*: hebrea *šeš*, araba *sitt*, akada *šuš*, egipta *sisu*, tuarega *sedis*, cigana *šob*, vaska *sei*, svahila *sita*, vjetnama *sáu*, ĉiuj komenciĝas per *s* aŭ *š*), sed kvar ekzemploj sufiĉas. El tiuj faktoj, mi konkludis per hipotezo (ne laŭmoda!), ke — ĉar plagiatoj estas ne pripenseblaj — tiuj ĉi vortoj parenas, ĉar ili estas naturaj. Kial ne? Eĉ la plej „laŭmodaj“ teorioj ne multe klarigas la devenon de la homa parolkapablo.

Scienca kaj ĝentila rebato povus: ĉu pruvi, ke mi citis mensogajn faktojn (sed ne eblas, ĉar mi ĉerpis miajn vortojn en dekoj da seriozaj vortaroj); ĉu proponi alian hipotezon por klarigi la cititajn faktojn. Bedaŭrinde, ne tion faras s-ro Golden. Li nek rebatas la faktojn cititajn, nek proponas alian hipotezon. La argumento, ke infano prononcas unue labialajn kaj dentalajn sonojn, ĝuste pravas, ke patro kaj „matro“ estas naturaj vortoj. Sed ĉefe B. Golden riproĉas, per akra kaj ne ege ĝentila tono, ke mia teorio ne sekvas la modon. Ve! Kiel diris Jean Cocteau, „la modo estas ĝuste tio, kio eksmodigas“, kaj — horora nepardoninda peko! — mi ne citis „la nomon aŭ verkon de eĉ unu nuntempe konata lingvisto“. Estas vere, mi konfesas kun humileco, ke mi tute ne apogas min skolastike sur la aŭtoritato de tiu aŭ alia altranga profesoro, sed simple sur faktoj. Ĉu ili kongruas aŭ ne kun la teorio plej ŝatata de s-ro Golden, mi fajfas pri tio.

Sed kial plu argumenti? Nur tre malmultaj profesiuloj de scienco aŭdis la lecionon de Claude Bernard: „kiam renkontata fakto kontraŭas regantan teorion, necesas akcepti la fakton kaj forlasi la teorion, eĉ se tiu ĉi, subtenata de eminentaj nomoj, estas ĝenerale adoptata.“

André Cherpillod

Kiu zorge legas Esperantajn publikigaĵojn kun atento pri lingvouzo, ne povas ne rimarki diversspecajn tendencojn, kiuj cikle aperas, malaperas kaj revenas dum la historio de la Internacia Lingvo. Laŭ la protestoj, kiuj manifestiĝas en la formo de leteroj al redakcioj, ŝajnas, ke Esperanto nun estas minacata de nova ondo da neologismemo, kaj tio agacas la lingvosenton de ĝisostuloj. Ankaŭ la landnoma demando komencas denove boli, same kiel la tikla temo de fonetika transskribo de propraj nomoj. Kaj lastatempe, post sufiĉe longa periodo de kvieteco, erupciis en diversaj partoj de Esperantujo atencoj kontraŭ la alfabeto, specife kontraŭ la supersignitaj literoj. Estas certe kiel duoble du estas kvar, ke post iom da tempo la ardo de la kontraŭneologisma tendaro, de la polemikuloj pri esperantigo de ĉiuj nomoj kaj de la alfabetmodifantoj malvarmiĝos. La probatalantoj de mallarĝa Fundamentismo kaj drasta reformemo formalaperos, kaj Esperanto restos por evolui.

Sed atendu! Ĉio ne estas tute en ordo. Ankoraŭ estas granda difekto en la lingvouzo, kiu ĝis nun estis preteratentita fare de la kutimaj kritikemuloj. Temas pri fremdaj vortoj kaj esprimoj en Esperantaj tekstoj. La lingvo, kiu plej ofte estas uzata tiurilate estas latino. Kvankam ĝi rolis kiel internacia komunikilo en Eŭropo dum pluraj jarcentoj post la dekadenco de Romio, ĝia nuntempa utilo por tutmonda interkomunikado estas nula. Tamen, latino fragmentece transvivas kiel esprimo en kelkaj kleraj (aŭ pseŭdokleraj) rondoj. Tiuj homoj, kiuj troviĝas ankaŭ en Esperantujo, kutimas lardi s'an skriban stilon per latinlingvaj ĉifonaĵoj. La sekvaj citaĵoj ilustras tion.

El *Literatura Foiro* (oktobro 1980, n-ro 63)) mi ĉerpis tri ekzemplojn.

1. „... la unuan fojon gajnis la premion du libroj *ex aequo*.“

2. „... sed li polemikis kaj kvazaŭ-profetis, dirante multon rekte kontraŭdiran *sui generis*. . .“

3. „La reĝo ĉe la norduloj estis kaj ankoraŭ hodiaŭ estas nur *primus inter pares*.“

Ne nur kultur-literaturaj publikigaĵoj pekas. En la junia (1980) numero de *Esperanto* troviĝas jena frazo.

4. „Unue, akiri la monrimedojn *primum vivere!* — kaj tial li fondis en 1956 eldonejon.

Ĉar frazo 4 estas tute klara sen la du latinaj vortoj, oni rajtas demandi, kial ili estis truditaj en ĝin. Ankoraŭ unu ekzemplo venas de la januara-marta numero de *Dialogo* (1980:1).

5. „S-ro Weide *dixit!*“

Se Esperanto vere estas internacia lingvo, kaj se ĝi kapablas esprimi ĉiujn nuancojn de etnolingvoj, kiel asertas entuziasmaj propagandistoj,

kial, do, kelkaj esperantistoj uzas latinajn vortojn, esprimojn kaj eĉ tutajn proverbojn, kiam ili verkas en Esperanto? Sajna kialo estas netradukebleco; ne estas eble redoni en Esperanto la sukplenan signifon de la originala latinaĵo. Se tiu vidpunkto estas prava, la malamikoj de Esperanto havas bonan bazon por ĵeti la Internacian Lingvon en la rubaĵojn kaj revivigi la latinan lingvon. Ke tiu kialo estas malĝusta, pruvas Edo Bernasconi (pseŭdonimo de Tazio Carlevaro), kiu esperantigas la latinajn esprimojn, kiujn li mem uzas.

1. *terra incognita* — regiono nekonata.
2. *O, sancta simplicitas* — Ho sankta nescio.
3. *Si licet parvum componere magno* — Se oni rajtas kompari malgrandulon al grandulo.

Verŝajne la vera kialo de uzo de latino hodiaŭ fare de kelkaj esperantistoj estas snobeco. Tiuj erudiĉuloj kaj duonerudiciuloj volonte montras al ĉiuj, ke ili akiris iom da poluro (aŭ rustiĝo) de prestiĝa antikva kulturo, kaj ili ne hezitas mistifiki legantojn de siaj verkoj per tio. Sed por tiuj, kiuj neniam lernis latinon, precipe multenombraj ekstereŭropaj esperantistoj, la partoj de la citaĵoj en latino estas same nekompreneblaj kiel estus ĉinaj kaj japanaj esprimoj en Esperantaj tekstoj destinitaj por okcidentuloj.

La celo de internacia lingvo estas faciligi komunikadon, ne starigi barilojn malhelpantajn interkomprenon. Uzo de fremdaj vortoj kaj esprimoj en Esperanta teksto okazigas malkomunikadon, kvazaŭ oni skribus per kodo aŭ kriptiĵo. Kion dirus tiuj amantoj de latino, se ili trovus en siaj plej ŝatataj periodaĵoj artikolojn pipritajn per helenaj, hebreaĵoj kaj sanskritaj „netradukeblaĵoj“? Ili tutcerte sakrus, sed ĉu Esperante aŭ latine?

NOVAJ PAROLADOJ DE TITO EN ESPERANTO

La Esperanto-Ligo de Bosnio kaj Hercegovino eldonos baldaŭ en Esperanto broŝuron dediĉitan al la Sesa Konferenco de ĉefoj de ŝtatoj aŭ registaroj de la neengaĝitaj landoj okazinta en septembro 1978 en Havano (Kubo). En la broŝuro aperos rezolucio pri speciala rekono al prezidento Tito, salutparolado de Seku Ture okaze de rekono fare de la Konferenco al Tito, dankvortoj de Tito al la Sesa Konferenco, ankaŭ lia parolado en la ĝeneralaj debatoj. Krome, en la broŝuro aperos informoj pri la Konferenco kaj plej signifaj ekstraktoj el la Fina Deklaracio kaj aliaj dokumentoj.

ANDRIĆ DENOVE EN ESPERANTO

Kiel eldonaĵo de E-Ligo de Bosnio kaj Hercegovino en Esperanto baldaŭ aperos plia novelkollekto de Ivo Andrić, konata jugoslavia verkisto kaj nobelpremiito, forpasinta en 1975. Jam pli frue, en 1973, aperis en la internacia lingvo la novelaro de Andrić sub titolo „Songoj kaj maldormo sub la karpenido“.

Rememorigo pri rimarkinda Esperanto-poeto

El Moskvo venis malĝoja sciigo: forpasis la rimarkinda lirikisto Konstantin Miĥajloviĉ Gusev, elstara soveta esperantisto, dediĉinta al la esperanta originala kaj traduka poezio multajn jarojn de sia spiritorika vivo.

K. Gusev naskiĝis la 31-an de januaro 1916 en urbo Voroneĵ. Tie li finis siajn studojn en la geografia-geologia fakultato en 1939. Jam pli frue ĉe li naskiĝis la amo al la poezio kaj li verkis siajn unuajn lirikajn poemojn. En gazetoj kaj revuoj komencis aperi lia nomo de promesanta poeto. Poste li publikigis du apartajn librojn (1946 kaj 1961) kun originalaj kaj tradukitaj poemoj en rusa lingvo. La poezia verkado kuniĝis kun verva ĵurnalista agado — gazetara korespondanto, redaktoro, publicisto. Preskaŭ dum tri jardekoj li laboris en la plej aŭtoritata soveta ĵurnalo „Pravda“.

Konstantin Gusev ellernis Esperanton dum la tridekaj jaroj.

Multajn jarojn de sia E-traduklaboro li dediĉis al verkoj de klasikaj rusaj kaj ukrainiaj poetoj, al modernaj sovetaj poetoj.

Travivinta la ruinigon de sia naskiĝurbo fare de hitleraj barbaroj, Gusev fariĝis arda adepto de paca vivo, interkompreniĝo kaj fratiĝo de la popoloj en la tuta mondo. Li agadis aktive en la Komisiono por Internaciaj Ligoj de Sovetaj Esperantistoj. Taksanta alte la agadon de la Mondpaca Esperantista Movado (MEM) li kunlaboris en ties eldonaĵoj.

Mi havis la feliĉon esti proksima amiko de Gusev kaj mi neniam forgesos la homecon, fontantan el lia koro kaj lia tipa slava fizionomio.

Kune kun li mi partoprenis du Universalajn Kongresojn de Esperanto — en Sofia (1963) kaj en Madrido (1968).

Lastan fojon mi vidis Gusev en 1978, gastante al li kaj lia simpatia edzino Ljudmila Ivanovna. Dum tagmanĝo mi tuŝis la eventualan eblecon pri eldono de aparta libro kun la du poemoj pri Lenin — de Majakovskij kaj de Voznesenskij, tradukitaj en Esperanton, tutpretaj por publikigo. Mi opinias, ke oni devas fari ĉion eblan por plenumi tiun vivrevon de la rimarkinda E-poeto.

Konstantin Gusev ne plu estas inter ni. Sed lia literatura heredaĵo riĉigis la originalan kaj la tradukan E-literaturon. Nome per ĝi li daŭre vivos kaj batalos vice kun ni por la grandegaj kaj noblaj celoj — homa progreso kaj monda paco.

Nikola Aleksiev

Honora Prezidanto de MEM

VOJO AL ANGKOR

Igor Pírek — Pnompeno

El Pnompeno oni veturas al Siemreap — la enirejo al Angkor — trans Battambang kaj Siphone, do laŭ la vojo, per kiu antaŭ du jaroj forkuradis el la lando restaĵoj de la Polpot'aj bandoj. Multaj pontoj estis neniigitaj dum la bataĵoj, multajn aliajn forportis vastaj inundoj. Same la ŝoseoj estis multloke tre difektitaj pro la akvo. La veturo kaj la stirado elpostulis de nia ŝoforo maksimuman koncentriĝon. Nome la provizoraj pontoj estis por nia nova „Lada 1500” nur malfacile travetureblaj. La kvalito de la ŝoseo ebligis mezkvantan rapidecon proksimume 20 ĝis 30 kilometrojn hore, tiel ke ni atingis Siemreap post du tutaj tagoj.

Kiam ni dum la veturo haltis en urbetoj aŭ vilaĝoj, ni estis atente observataj de la lokaj homoj. Dum la lastaj jaroj ja ne okazis ofte, ke oni ĉiutage renkontu ĉi tie eŭropanon. Sur la bazaroj ni ĉie vidis multajn tropikajn fruktojn, diversajn fiŝojn, viandon kaj aliajn manĝaĵojn. En la tropika varmo ni pleje ŝatis kokosojn.

Antaŭ la regado de la Polpot'anoj urbo Siemreap vivis plejparte per turismo. Miloj da vizitantoj alveturis ĉiujare por admiri la belaĵojn, kiujn ĉi tie antaŭ jarcentoj ensorĉis en la ŝtonojn la ĥimeraj belartistoj. Sed hodiaŭ krom ni en belega hotelo estis nur grupeto da laborantoj de Internacia Ruĝa Kruco, laborantaj en la norda parto de la lando kaj alveturintaj ĉi tien pasigis sian semajnofinan libertempon. Dum interparolo kun la estrino de la hotelo mi eksciis, ke el kelkdeko da turistgvidantoj nur tri transvivis la polpotan genocidon, ŝi mem perdis la tutan familion.

El Siemreap ĝis vidindaĵoj en Angkor, kiujn

oni taksas kiel la sepan mirindaĵon de la mondo, estas nur kelkaj kilometroj. La densa tropika arbaro subite kvazaŭ en sankteca teruro distariĝas, kaj antaŭ ni aperas grandegaj turoj, enkatenigitaj per ŝtonmuregoj, kaj post ili videblas la siluetoj de la temploj, super kiuj superleviĝas la turoj, ornamitaj per reliefoj de Budao. La vastampleksaj ŝtonreliefoj kun scenoj el la mitologio kaj el la fama ĥimera pasinteco ornamas la koridorojn kaj arkadojn de la templo.

Sur multaj lokoj estas videble, ke la tuta komplekso atendas vastan kaj fundamentan rekonstruon. Sub iuj turoj kuŝas defalintaj grandegaj sabloŝtonaj blokoj, multaj konstruaĵoj estas difektitaj de la trokreska tropika vegetaĵaro.

Parte helpas al tio nuntempe ankaŭ ŝtelistoj de artmemoraĵoj, kiuj senkapigas ŝtonstatuojn kaj vendas ĉi tiujn ŝtonkapojn al revendistoj en Tajlando. Tre altaj prezoj — ĝis dek mil dolaroj por parto de la artmemoraĵo instigas la ŝtelistojn al neordinara aroganteco.

La gvidisto atentigis min pri tio, ke la registaro jam komencis vastan kampanjon por savi la plej grandan kampuĉian historian artmemoraĵon. Ĉar ĝi dume ne havas sufiĉajn teknikajn kaj financajn rimedojn por tiom vasta agado ĝi petis internacian helpon, precipe por liveri komplikajn teknikojn kaj instrui centojn da restaŭrantoj. Ankaŭ ĉi tiuj planoj montras ĉiuflankecan solidigon de la rilatoj en la lando.

Dum reveno al Pnompeno ni vidis sur la kampoj viglan laboron pri riĉa rikolto de rizo, sur kelkaj lokoj oni riparis pontojn. Ĉirkaŭ la ŝoseo kreskis amasoj da sablo, gruzo kaj bareloj kun asfalto. Laŭ antaŭnelonga decido de la registaro oni dum plej proksimaj monatoj rekonstruos la ŝoseon de Pnompeno al Battambang. La kampuĉiaj gvidantoj konscias bezonon de kvalita trafikreto por disvolvo de la nacia ekonomio. La vizitantoj de Angkor jam baldaŭ veturos sur la ŝoseo kun nova, asfaltita surfaco, la pontoj estos riparitaj, eble estos renovigita ankaŭ la civila aertrafiko al Siemreap, kiu mallongigos la vojon ĝis malpli ol unu horo.

Esperantigis J. Tomíšek

Nederlandano en Aŭstralio

☞ Ni havis tre interesan vojaĝon en Aŭstralio. Ni veturis per aŭto 6000 km, kvankam ni vizitis nur la sud-orientan parton de la landego (inter Brisbano kaj insulo Filip sude de Melburno). Ni gastis ĉe ok esperantistaj familioj, loĝis en ruldomejoj kaj moteloj, vidis multajn birdspeciojn (166 el kiuj 155 speciojn mi ankoraŭ neniam vidis), vizitis plurajn esp. klubojn kaj vizitis ambasadoron Ralf Harry en lia hejmo en Kanbero. Kompreneble ni multe parolis, ĉefe

en Esperanto. Mian anglan lingvon mi komprenas, sed mi ne komprenas ilin, ĉar ili parolas tiel fortan dialekton, ke al ni ŝajnis, ke ili parolis ĉine. Kiel ajn, ni denove havis pruvon, ke la angla lingvo tute disdialektiĝis.

La lando estas ege seka. En Sidneo ne pluvis dum unu kaj duono da jaroj. La kampoj estas tute flavaj, la tritiko 20 cm alta kaj tute flava kiel ĉe ni en la malfrua somero, sed tiam ĉe ni unu metron alta. Ĉe ili tamen estis printempo.

Neniam en mia vivo mi vidis tiom da mortintaj kaj mortbruliĝintaj arboj kaj arbaroj. Ni estis tie de la 29a de septembro ĝis la 7a de novembro. La vetero estis preskaŭ ĉiam belega (inter 25 kaj 32 gr).

Avantaĝo en tiu lando estas, ke oni havas multe da spaco. En ĝi loĝas nun 14 milionoj da homoj (same en nia landeto) kaj ĝi estas 220-oble pli granda ol la nia! Sed praktike nur la randoj de la kontinento estas loĝeblaj! Nia "bazo" estis Sidneo. La urbo havas 3,5 milionojn da enloĝantoj. Pro tio ke ĉiu familio havas aparte starantan domon kun sufiĉe granda ĝardeno (escepte de ege malmultaj, kiuj loĝas en apartamentoj), la urbo kovras grandegan areon. Trioble Sidneo estas la areo de tuta Nederlando. Melburno havas 2,5 milionojn da enloĝantoj, Brisbano 900000 kaj Kanbero 250000. Tio signifas, ke nur la "parteto", kiun ni vizitis, enhavas la duonon de la tuta aŭstralia loĝantaro. Ekster la urboj la vojoj estas preskaŭ tute malplenaj. Oni povas veturi horojn sen renkonti iun ajn. La aliaj "urboj" estas ege malgrandaj laŭ nia koncepto. Tamen ĉio estas aĉetebla ankaŭ en tiuj malgrandaj loĝataj "makuloj", ĉar en la vastega kamparo ne ekzistas butikoj, do ĉiu venas al la „proksimaj urb(et)oj“ por fari aĉetojn.

La vivnivelo en la lando estas sufiĉe alta, kvankam malpli ol ĉe ni, ŝajnas al ni. Ĉiu posedas aŭton, ofte eĉ plurajn aŭtojn en familio. 80% el la familioj posedas propran domon, kvankam preskaŭ neniu domo eltenus nederlandan vintron kaj nian klimaton. Tamen la domoj taŭgas en ilia klimato. Regas en la lando granda senlaboreco. Kiam mi informiĝis pri tio, kelkaj menciis al mi la ciferon de 8%, kio estas multega. Homoj kun malforta sanstato troviĝas tie en tre mizera pozicio. Dum tuta jaro oni havas en la ŝtato Nova Sud-Kimrujo, kie ni ĉefe estis, nur 10 tagojn de malsanrajto. Kiam oni malsanas ekz. 15 tagojn, oni ricevas por la lastaj 5 tagoj (laborsemajno) nur la duonon de la salajro. Post tiuj sume 15 tagoj la enspezoj ĉesas kaj oni ricevas t. n. "senlaborulan subvencion" kio estas tro multe por morti kaj tro malmulte por vivi. En tiu lando oni devas asekuri sin kontraŭ ĉio ajn, unualoke kontraŭ la risko de malsano. La flegado en la malsanulejoj estas senpaga, almenaŭ la nura kuŝado, kvankam la unuan tagon oni devas pagi 20 dolarojn. Plie oni devas pagi ĉiujn medikamentojn kaj la konsultojn de kuracistoj kaj specialistoj. Ni do preferas nian landon! Tamen ankaŭ ĉe ni la nombro de senlaboruloj jam altiĝis super 300000 t. e. 6% de la laborularo. Sed ili ricevas 80% de la antaŭa salajro dum duona jaro, kio poste malpliĝas ĝis 70%. Nia vetero tamen ne estas aŭstralia, sed mi diru, ke mi malŝategas temperaturojn ĝis 40%.

Ru Bossong

Vladimir Dunaev (Lima)

NIA HORO DV ALVENOS MA

(Interparolo kun ĉilia patrioto)

Ni sidas en malgranda gastejo. En la perua ĉefurbo ili estas sennombraj. Mia kunulo, ankoraŭ juna viro, estas ĉilia kuracisto, kiu antaŭ nelonge veturis al Peruo. Kvankam ekstere sonas bruo kaj nin ĉirkaŭantaj tabloj estas neokupataj, li parolas mallaŭte kaj tempo de tempo singarde ĉirkaŭrigardas.

Nia interparolo nature turniĝas al la "lasta sukceso" de la Pinoĉeta demokratio, al plebiscito je la 11-a de septembro lastjara, kiu aprobis la novan konstitucion, leĝigantan la registaron de la militista diktatoro kaj plilongigis lian sangan "mandaton". Al mia demando, kiel akceptis ĉilianoj la rezultojn de la voĉdonado, la doktoro respondis, ke neniu eĉ por momento dubis pri "venko" de la militista reĝimo. Disputoj okazis nur pri tio, kun kiom da procentoj la diktatoro "skribos" sian venkon. Li denove singarde ĉirkaŭrigardis kaj aldonis: "Ne pensu, ke eblis senkaŝe diri ĉion. Ĉilianoj jam longatempe dekutimiĝis paroli sen ĉirkaŭrigardo."

Doktoro Eduardo (ni nomu lin tiamaniere) rakontas plu:

"Mi voĉdonis en la centro de la ĉefurdo, kie loĝas precipe riĉuloj kaj reakcie pensantaj homoj. En mia balotcentro la nombro de la voĉoj, fordonitaj por la Pinoĉeta konstitucio, ne estis pli alta ol kvindekprocenta. Vi povas imagi, kiom da voĉdoniloj kun vorto "ne" estis enurnigitaj en la laboristaj kvartaloj. La voĉdonado fariĝis efektiva farso. Unu kristandemokrata eksdeputito ĉe voĉdonado faris jenan eksperimenton: Li voĉdonis en la loko de sia loĝado, poste sen ajna peno degluis markon kun atesto ke li voĉdonis, forlavis la laŭ oficejdeklaro "neforlaveblan" farbon el la dikfingro, de kiu oni forprenis premsignon, atestanta pri "plenumo" de la civitana devoligo kaj decidis voĉdoni duan fojon en alia voĉdonloko. Li sukcesis voĉdoni sen iu ajn malfacilaĵo. Tiu ĉi sistemo ja donis nelimigitajn eblecojn eĉ al la oficialaj organoj de la ŝtata povo diversmaniere falsi la balotrezultojn. Kaj tiamaniere tio ankaŭ fakte okazis."

Kaj kio efektive ŝanĝiĝis post la voĉdonado, post "aprobo" de la Pinoĉeta konstitucio?

"Praktike nenio", respondis la kuracisto. "Senĉese la samaj reprezalioj, la sama malaperado de homoj surstrate, la sama surtretado de la homrajtoj. Kelkajn tagojn antaŭ mia forveturo, fine de oktobro, estis en lumplena tago forprenita studento, filo de mia bona konatino kaj perdiĝis senspore. Ĝis hodiaŭ neniu scias, kio okazis pri li. Kaj similajn okazaĵojn oni povus nombr

je dekoj. Eĉ ordinara procesio de parencaro de homoj, kiuj "perdiĝis" senspure, precipe de virinoj pilgrimantaj al la statuo de la Senmakula Virgulino sur la montosupro San Kristobal en Santiago elvokis maltrankviliĝon kaj timon ĉe la polico, plifortigitan inspektan super la manifestanĉoj kaj poste eĉ areston de kelkaj el ili.

Pinoĉet kaj liaj helpantoj, kiel oni scias, ne hontas uzi reprezaliojn eĉ kontraŭ ekleziularo. Opozicia agado, kiun praktikas la ĉefo de la katolika eklezio en nia lando, kardinalo Silva Hernandez, celanta protekti la homrajtojn en nia lando, estas subtenata de la plejmulto de la kredantoj. Malgraŭ tio la gazetaro en la ĉefurbo disvolvis, kun konsento de la gvidorganoj, kampanjon kontraŭ la kardinalo, kalumniante kaj kulpigante lin, ke li kunlaboris preparadon de konspiro kun celo renversi la regantan klikon de Pinoĉet.

La reganta kliko strebas kontraŭstari la ĉiam pligrandiĝantan malkonsenton, kreante atmosferon de spionado, suspektemo kaj timo. Doktoro Eduardo diras, ke ĉiliano en neniu publika loko kaj institucio sin sentas sekura: en kinejo, teatro, subtera fervojo, aŭtobuso aŭ restoracio, ĉie troviĝas spiono. Nuntempe en Ĉilio oni malfacile povas trovi organon de la homamaso informado, kiu rekte esprimus sian malkonsenton pri la reĝimo aŭ kritikas ĝian agadon. La ilustrita semajngazeto "Hoy" estas ununura leĝa organo de la opozicio. "Kiam mi ĉiumerkrede aĉetas ĉi gazeton", aldonas la doktoro, "la sinjo-

rino, kiu vendas en kiosko kaj konas min jam kelkajn jarojn, ĉiufoje enmetas ĝin en "Mercurion" por protekti min kontraŭ spionado."

Reprezentantoj de la registaro kaj ilia oficiala gazetaro, same kiel iuj amaskomunikiloj en okcidentaj landoj multe parolas kaj skribas pri "ekonomia florado", kiun Ĉilio nuntempe travivas. Kion vi povas diri pri tio?

"Nur tion, ke la nuna ekonomia sistemo servas al bonfarto, aŭ pli bone dirite al pliriĉiĝo de manpleno de regantoj. En la tuta lando katastrofe kreskas senlaboreco. El la tri miliojn kaj duono da aktiva laborkapabla loĝantaro 14% havas nenian laboron kaj pliaj dudek procentoj estas duone senlaboraj. Nur en Santiago estas cent mil familioj mizere vivantaj. Kun oficiale starigita minimuma salajro, kiun oni ne ĉiam plenumas, laboristo povas per sia tuttaga salajro aĉeti nur unu kilogramon da pano. Kontraŭe, Pinoĉet povas investi por reconstruo de sia domo du milionojn da dolaroj. Ĉu oni bezonas komentan pri tio?"

Mi ankoraŭ longan tempon parolas kun kuracisto Eduardo. El liaj vortoj sonas profunda doloro pro la malfeliĉo kaj tragedio, kiujn travivas lia popolo. Sed samtempe ĉi tiuj vortoj malkaŝas ankaŭ firman konvinkon, ke venos la horo, kiam la liberecon amanta ĉilia popolo forigos la diktaturon, denove akiros liberecon kaj vivos la vivon indan de sia heroo historio.

Esperantigis J. Tomišek

la tria lingvo de la skolto

Inter la eksponaĵoj de la regiona muzeo en Talica (Uralo) estas du libretoj jam flaviĝintaj pro la longa tempo: E-rusa lernolibro kaj E-rusa konversacilibro, apartenintaj al la jam legenda skolto, Heroo de Sovetunio N. I. Kuznecov. La gardistino (kuratorino) de la muzeo, iama samklasano de la heroo, atestas, ke N. Kuznecov studis Esperanton, jam de sia 14-jariĝo. La skolto Kuznecov senripoĉe parolis germane, grandan rolon por tiu ekrego havis Esperanto, kiun N. I. Kuznecov regis perfekte.

Antaŭ nelonge mi ripozis en la kaŭkazia turisma stacio Dombaj. Kune kun ni estis gastoj el Federacia Respubliko Germanio. Dum la unuaj tagoj ni preskaŭ ne kontaktis, ĉar ne posedis la lingvojn. Tamen iun vesperon, kiam mi surmetis jakon kun verda stelo, min alparolis alta, ankoraŭ fortika oldulo, en Esperanto.

— Mi bedaŭras, ke mi nur hodiaŭ eksciis pri via esperantisteco.

Mi ne rapidis respondi al la nekonata homo, kiu laŭage eble batalis dum la lasta milito kontraŭ nia popolo.

— Ĉu vi unuan fojon vizitas Kaŭkazon?

— Ne, jam la duan — oni militkaptis min same en ĉi tiuj lokoj kaj mi multon ekkonsciis,

estante militkaptito. — Post paŭzo li daŭrigis: — Mi supozas, pri kio vi nun pensas: dum la milito ni ja malamikis. . . .

— Germanoj ekstermis en Odeso mian tutan familion, ĉar ĝi estis juda.

— Jen vi diras — germanoj, — sopirĝemis la oldulo. — Tamen ne ĉiuj ili kondukis kruele. Mi konis unu germanon — leŭtenanton Paul — kiu helpadis al vi jam en 1943, kiam Hitler ankoraŭ ofensivis sukcese.

Kaj la oldulo komencis sian rakonton:

En 1942 mi militservis en malgranda ukrainia urbeto, kies nomon mi nun ne plu memoras. Mi estis skribisto ĉe oficejo, kiu organizis batalpersekutojn kontraŭ partizanoj. Mi ne volas mensogi, ke jam en tiuj tempoj mi ne kredis al Hitler, tamen por mi estis abomenaj diversaj naciistoj kaj perfiduloj, kiuj sin kaŝis inter la partizanoj por poste transdoni ilin en la manojn de la polico. Rakonti kion la okupantoj faris pri viaj batalantoj estas superflue, ĉar vi mem ĉion scias.

Mi ne scias pro kio, eble pro tio, ke nazioj ne sukcesis mortigi la homecon en mi, mi ne

povis observi kiel oni turmentas viajn geknabojn, mi volonte perfidus tiujn perfidulojn, kiuj kaŭzis la turmentojn, por ke oni punu la fiulojn, tamen al kiu diri? . . . Profunde malĝoja mi volis forgesi pri ĉio kaj vizitadis vesperan restoracion, kie mi forgesis per alkoholaĵo pri miaj skrupuloj. Tiel drinkante, mi rimarkis, ke min observas iu leŭtenanto. Tio estis Paul.

Unu fojon li alsidis min, mendis konjakon kaj, tintante per la pokaletoj, sin esprimis latine:

— In vino veritas. (Vero sin kaŝas en la vino).

Nesciante la lingvon, mi respondis en simila al ĝi Esperanto:

— Drinku, drinku, tamen menson ne fordrinku.

— Ho, vi regas la noblan latinon! — ĝoje diris la leŭtenanto. — Ĉu mi povas praktiki kun vi en tiu lingvo?

Verdire, mi ektimis, Hitler anatemis Esperanton en sia "Mein Kampf" kaj Bormann per speciala cirkulero malpermesis ĝian uzadon por membroj de la nazia partio, al kiuj apartenis ankaŭ mi. Tamen Paul ekplaĉis al mi. Krom tio ni parolis ne malpermesitan Esperanton — ni konversaciis en nobla latino — se iu akuzus min, mi min pravigus, ke simple ni misparolis unu lingvon anstataŭ alian similan, aŭ ke fiuloj esperantistoj lernigis al mi sian lingvaĉon, nominte ĝin latino.

Tiel aŭ alimaniere, post tiu parolo ni ĉiuj vespere renkontiĝadis kaj paroladis kun Paul. Li igis min konfidi al li multon, kaj mi, ŝajnigante min ebria, kvazaŭ nevole, elbabiladis al li sekretojn de la polico. Unu fojon, post simila konversacio, li enigme malaperigis provokanton, kiun germanoj penetrigis inter partizanoj. Baldaŭ li estis mortekzekutita, laŭ decido de la gerila juĝantaro.

Tiamaniere mi multon elbabilis al Paul, kaj miaj vortoj efikis, ĉar trafis la celon.

— Kaj kio okazis poste? — demandis mi.

— Al iu niaj paroloj iĝis suspektindaj: kiamaniere mi, homo fininta nur tri klasojn en mezlernejo, tiom flue min esprimas "latine"? Tamen baldaŭ niaj renkontiĝoj ĉesis. Paŭlo ien malaperis, kaj min oni forsendis al la batalfronto. Apud Novorosijsk en Kaŭkazio, mi transdonis min al la rusoj.

— Kaj kion vi pensas pri Paul?

— Sendube li estis germana oficiro, servanta kiel sovetia skolto. Li multe vojaĝis, ofte sidis en restoracio por kolekti informojn de ebriaj oficiroj, tamen kiam mi ekvolis informiĝi, kie li militservas, tion fari mi ne sukcesis. . . Tamen ĉefa pruvo: miaj vortoj atingis la partizanojn kaj efikis. Ĉu vi konsentas, ke tiel povas kondukti nur sovetia agento?

— Jes, vi pravas. Tamen ĉu vi certas, ke li efektive estis germano?

Mia kunparolinto ekstumblis kaj, riproĉe balancinte la kapon, diris:

— Juna homo, ĉu vi eĉ por momento povas pensi, ke mi ne distingus rusion disde germano? Kiam mia samnaciono nur malfermas la buŝon,

mi tuj povas diri el kiu parto de Germanio li devenas. Kaj Paul estis mia samprovincano: same kiel mi li naskiĝis en Orienta Prusio. Mi tion tuj komprenis laŭ lia prusa prononco. Sajne tio proksimigis min al li kaj min inklinigis malkaŝi sekretojn.

Kaj denove kun riproĉo skuinte la kapon, li aliĝis al sia turisma grupo.

La sekvan tagon la germana grupo forveturis, Tamen, akompaninte ilin, mi plu pensis pri la oldula rakonto. "Mensogis li: multaj iamaj faŝistoj ŝajnigas, kvazaŭ ankaŭ ili batatis kontraŭ Hitler. . . Sed, pro kio mensogi, se ni neniam plu renkontiĝos? . . . Tamen, pro kio ne povis ekzisti skolto-kontraŭfaŝisto, kiu uzis la lingvon internacian? Oni devas esplori la aferon." Kaj mi decidis klarigi la enigmon por mi mem.

Por komenco oni devas ekscii, kiu inter la sovetaj skoltoj (ĉu germano, ĉu rusoj) parolis kun klara germana prononco germane. Mi mergiĝis en la detektivan literaturon. Unu fojon miaj okuloj haltis sur rakonto pri la iama heroo Nikolao Kuznecov, pli precize — pri lia vizito al la gaŭlajtero de Ukrainio, la orientgermana pruso Erich Koch.

Estis la 31a de majo 1943. Kun la gaŭlajtero parolas leŭtenanto de la germana armeo. Li havas ordonon mortpafi Erich Koch. Tamen kiel, se li ne povas preni el la poŝo eĉ naztukon, ne parolante pri pistolo: kvin gardistoj senĉese observadas lin, ne nombrante la du gardhundeĝojn ĉe la piedoj de la gaŭlajtero. Kion do fari? Eble iel alie utiligi la viziton al la grava persono — akiri informojn por la sovetia armeo?

— Herr gauleiter, mi ege zorgas pri la proksima sorto de mia kara naskiĝlando Orienta Prusio. Rusaj porkoj jam staras ĉe la limo.

— Jes, kara samprovinciano Paul — mi rekonis laŭ via prononco, ke vi naskiĝis en Prusio same kiel mi — bedaŭrinde, la rusoj venis tro prokisme. Tamen, vi ja ne maltrankviliĝu: Hitler konfidis al mi tute sekrete, ke baldaŭ apud Kursk ni rompos la vertebraron de rusa Ivano.

— Tamen la rusaj tankoj! — daŭrigis la ludon Kuznecov, — Niaj obusoj ne traas ilian ŝtalon.

— Apud Kursk ni la unuan fojon uzos sekretan armilon — "Tigrojn" kaj "Panterojn". Kontraŭ ili ne ekzistas defendo. Ni, prusoj, estas nevenkeblaj. . .

El la kabineto de Koch Kuznecov eliris ekscitita. La saman vesperon sekreta informo atingis Moskvon, kaj la supera militestraro alte taksis la informon. . .

Tiu epizodo interesis min pro kelkaj kaŭzoj. Kuznecov parolis kun prusa prononco, agis en Ukrainio kaj sin kaŝis sub la nomo Paul, jes, Paul Vilhelm Sibert. Multaj koincidoj. Mankis ankoraŭ unu, grava, ke li flue parolis ankaŭ Esperanton. En la libroj pri la fama skolto, mi ne trovis aludon pri lia esperantisteco. Do, ne pri li rakontis mia hazarda renkontinto? Do, ĉesigi la serĉon ĉi-direkte? Tamen en la historio

de Kuznecov min, homon lingveman, jam interesis la fakto: kiel rusa homo, neniam loĝinta en Germanio, tiom ekposedis la germanan lingvon, ke germanoj opiniis lin samnacio! Varmigis min ankaŭ penso, ke, divenante la enigmon, mi eble malkovros lian esperantistecon — multaj samideanoj penas plene regi ankaŭ almenaŭ unu fremdan lingvon.

Min interesis ĉu lingvemulo kiel Kuznecov povis preteriri la lingvon internacian, tiom disvastigitan en nia lando en la 20aj — 30aj jaroj? Ne, li ne povis, — respondas en sia libro „Skolto Kuznecov” lia frato Viktor Ivanoviĉ. Li mencias, ke kiel junulo Nikolao fervoregis pri Esperanto. Tamen, ĉu li ĝin parolis, des pli — flue, pri tio la libro silentas.

Kiel ofte okazas, pri unu sama enigmo pensas paralele kelkaj homoj. Aktivuloj el la Tjumena universitato (Uralo), leginte la saman libron — iliaj nomoj estas V. Opletajev kaj A. Kalaŝnikov — decidis malkovri, kian rolon havis Esperanto por la internacia edukado de Kuznecov, des pli, ke ankaŭ Kuznecov studis en Tjumen en tiuj jaroj, kiam li okupiĝis pri Esperanto.

Tamen ili faris ĉion paŝon post paŝo: vizitis Talica, poste Sverdlovsk, serĉante atestantojn de la juneco de Kuznecov. Kaj ili sukcesis — samklasano de heroo ekmemoris, ke en lia lernejo funkciis E-rondeto gvidata de Suetin, en kiu la plej diligenta estis iu Nikolao. Kaj en la muzeo de Sverdlovsk, dediĉita al la skolto, ili trovis materialon pruvon de tiu aserto: lernolibron de Esperanto, sur kies kovrilo tekstis: „Al kamarado Kuznecov — por ke li ellernu kun la rondetanoj”.

— Tio okazis en la aŭtuno 1926 — rakontis Besednih al Opletajev kaj Kalaŝnikov. — Al la „ruĝa anguleto” en nia uzino venis nigrookula junulo en uniformo. Li prezentis sin kiel studenton en la Tjumena agrikultura lernejo: Nikolao Kuznecov. Tiutempe li jam plene regis Esperanton, mirigante min per sia kapablo uzi eĉ plej komplikajn frazojn. Li bone recitis versaĵojn kaj muzikis harmonikon, allogante tiel la homojn.

Esperanto ne estis por li mallongdaŭra hobbio, la ideo ekposedis lin por la tuta vivo. Mi memoras, ke en 1927, okaze la X-an jubileon de la Ruĝa Oktobro, li tenis inter la rondetanoj sloganon en Esperanto „Proletoj ĉiulandaj, unuiĝu!” kaj tiel manifestaciis. . .

Finante tiun ĉi eseon, la aŭtoro supozas, ke Kuznecov estis tiu sama „germano”, pri kiu mi ekaŭdis en Dombaj. Tamen, ĉu certe? Eble ekzistas aliaj skoltoj, rusoj, germanoj, alinacianoj, kiuj uzis Esperanton en la batalo kontraŭ la faŝismo. Tamen pri tio — reeĥu niaj eŭropaj, unue — germanaj samideanoj. Serĉu aliajn, jam forgesitajn batalantojn, kiuj uzis nian internacian armilon, la lingvon kontraŭ la reĝimo de Hitler, same kiel faris tion la esperantisto heroo N. Kuznecov.

Aleksandro Harkovskij
(Moskvo)

korespondemuloj

Vjetnamio

Esperanto-ekspozicio en 1981 okaze de la 25-jara fondo de Vjetnama Pacdefenda Esperantista Asocio. Ĉiuj E-aĵoj, francaj, anglaj ŝlosiloj, lernolibroj estas bonvenaj — VPEA, 107 Guan Thánh, Hanoi — Vjetnamio, VPEA — filio en urbo HO CHI MINH, bulv, Nguyễn Huệ 66 (137) K-do Nguyen-hai-Trung.

Onklo Nguyen van Kinh okaze de sia 50 jara esperantigo en 1981 nepre respondos al ĉiu infana esperantisto(in)o el ĉi. Vjetnamio Hanoj-4, phố Ba Huyen Thanh Guan

Kampuĉio

Komencantoj deziras korespondi per il.PK- kaj petas E. lernolibrojn, E. informilojn en franca, angla, rusa lingvoj. Adreso: S-ro Peou You Len — Esperanto Korespondado — Direktoro de Komisiono de Artoj, Cité des Artistes, PNOM PENH, Republique populaire du Cambodge (Kampuĉio).

S-ro Navouth—Esperanto Korespondado — Ministère de l’Éducation nationale, — PNOM PENH.

Laŭlando

Komencantoj deziras korespondi per il. P. K. k. petas E. lernolibrojn, informilojn, ŝlosilojn, gazetojn en franca, angla, rusa lingvoj. Adreso: S-ro Suk Vongsak-Esperanto Korespondado-Ministere de la Santé, Vientiane, Republique populaire LAO (Laŭlando).

S-ro Chaleune Warinthrasak-Esperanto Korespondado, Depart, Pays socialistes, Ministère des Affaires étrangères, Vientiane, RDP LAO (Laŭlando).

GDR

S-ino Käthe Mönch, 63-jara, Beethovenstrasse 10, 4020 Halle, tm pri ĉt.

Brigitte Schwartze, 4020 Halle/Saale, Seebener Str. 31—37-jara tm pri ĉt.

USSR

Sergej Saŝmin, 454026 Ĉeljabinsk, pr. Pobedy 306, kv. 104—15 j. lernanto, tm. pri literaturo, muziko, sporto, teĥniko, lingvoj, insignoj, bk, pm.

Audrius Kutrevičius, 235300 Panewezys, Ramygalos 69—36, Litovio, USSR — 15 j. lernanto.

Se vi deziras amiki kaj korespondi kun geesperantistoj el antikva Samarkando turnu vin al: Samarkanda Esperanto-Klubo de Interpopola Amikeco, SU-703000 Samarkand, Glavpoĉtamt P. K. 76, Uzbekistano, USSR

Hispanio

J. Planes Mtez, str. Senda de Granada 6, Espinardo (Murcia), Hispanio — 21-j. lingvo-studento — kun fraŭlinoj el ĉi., sed precipe el: Japanio, Indonezio, Tajlando, Italio, Francio, Britio.



Jaro XXVIII, № 3
majo-junie, 1981

REDAKTA KOMITATO

Violin Oljanov (Bulgario) — ĉefredaktoro
Nikola Aleksiev (Bulgario)
D-ro Detlev Blanke (GDR)
André Cheprillod (Francio)
William Gilbert (Francio)
Oldrich Knichal (ĈSSR)
Kimiaki Kurita (Japanio)
Nguyen Hai Trung (Vjetnamio)
Boleslav Staszczak (Pollando)

Lingva revizio: **Asen Grigorov** (Bulgario)
Arta aranĝo: **Kiril Drajev** (Bulgario)
Korektis: **Rajna Konstantinova** (Bulgario)

La Redakcio atendas kontribuadojn de pacamikoj el la tuta mondo. Ju pli da kunlaborantoj, des pli varia kaj interesa revuo. Pro la nesufiĉa spaco la materialoj ne estu pli longaj ol 60 tajpitaj linioj, nur en gravaj kazoj — ĝis 90-. Ili estu prefere tajpitaj aŭ tre klare mane skribitaj kun sufiĉa interlinia spaco kaj margeno, sur grandaj folioj da kancelaria formato. La Redakcio akceptas nur originalan (unuan) ekzempleron de la tajpaĵo. Kopioj estas lasataj sen konsidero. Skribu klare viajn nomojn kaj adresojn en nacia lingvo! La Redakcio ne resendadas neuzitajn materialojn.

KIEN SKRIBI.

Honora Prezidanto: Nikola Aleksiev, str. Nezabravka 1 vĥod 2 1113 SOFIA, Bulgario.

Prezidanto: D-ro Pethes Imre, H-1940 BUDAPEST VI, Nepskőztársaság utja 73, Hungario.

Vicprezidantoj: D-ro Magomet Isaev, prosp. Kalinina 14, MOSKVA K-9, USSR

Glady Claude, 36 Marne Str. B-1030 BRUSSEL, Belgio

Generala sekretario: William Gilbert, 30 rue Croix-Montoire, 37100 Tours, Francio

Sekretarioj: Syozi Nanba, Huruiti 3-13-26, Zyôto-ku, OSAKA, Japanio.

Inĝ. Angel Todorov, bulv. Emil Markov, bl. 37, II 1404 SOFIA, Bulgario.

Ĉefredaktoro: Violin Oljanov, bulv. Emil Markov, P. K. 66, 1404 SOFIA, Bulgario.

Centra administranto: Vasja Petrova, Bulgara MEM Komitato, bulv. Hristo Botev 97, 1303 Sofia, Bulgario

Centra kasisto: (Por la okcidentaj landoj) Pierre Jouvin, 14 rue Thiers, 76120 Grand Quevilly, Francio (Poŝtkonto CCR — Rouen, 102—45 P.)

Respondeculo pri landaj numeroj de "PACO": Helmut Fuchs, Hohe Str. 33, DR-83, PIRNA, GDR.

KIE ABONI?

Aŭstralio: N. A. Collier, 7 Monomeeth St. BUDERIM Qld. 4556.

Aŭstrio: Ernesto Quietensky, Pappenheimgasse 70/3/12, A-1200 WIEN AŭS. 100.—

Belgio: Glady Claude, 36 Marne Str, 1030 BRUSSEL,

Britio: Paul Hewitt, Laycroft, Main Road, COVENHAM, Louth, Lincs, LN11, OPF £ 4 —

Bulgario: Bulgara MEM-KOMITATO, bulv. Hristo Botev 97, 1303 SOFIA 3 levoj

Ĉeĥoslovakio: Ĉeĥa Esperanto-Asocio, MEM-Sekcio, Jilská 10, 11000 PRAHA 1 30 kronoj

Danlando: Egon Starup, Brovaenget 26, DK-2700 KOBENHAVN BRH. 35 d. kr.

F. R. Germanio: Roland H. Hegen, Iggelbach, Schlossgasse 30, D-6731 ELMSTEIN 20 DM.

Finnlando: Erkki Järvinen, Ukonkivenpolku 2-1-68, 01610 VANTAA 61. 30 fin. m.

Francio: Roger Degrelle, B. P. 23, F-54510 Tomblaine (771.77 R. Nancy — poŝtekkonto) 40 fr. fr.

Germana Demokratia Respubliko: Centra Laborrondo Esperanto en la Kulturligo de GDR, Charlottenstr. 60, 108 BERLIN 30 DM

Hispanio: Luis Serrano Perez, Font Nova 32, SABADELL (Barcelona). 750 pesetoj

Hungario: Hungara MEM-KOMITATO, H-1368 BUDAPEST 5, pf. 193 36 forintoj

Italio: Riccardo Pinori, V, le Ghisleri 9/15, I-00176 ROMA (p. ĝ. k. 64882004).

Japanio: Kurita Kimiaki, 411 Misima, Yata Sakuragaoka 1209—98 (Japana Pacdefenda Esperantista Asocio).

Kubo. Rufino López, Havana Esp. -Rondo, Poŝtkesto 314, HABANA 1

Norvegio: Olaf Reiersol, Buerstad, N-3135 TOROD

Pollando: RUCH — WARSZAWA.

Portugaliao: Portugala E-Asocio, Rua Dr. Joao Couto 6 R/C A-LISBOA 350 escudo

Rumanio: Cosma Dorin, Muzicescu 26, sc. C. ap. 11, R-1900 TIMISOARA.

Socialisma Respubliko Vjetnamio; Vjetnama Pacdefenda Esperantista Asocio, 107 Quan Thanh, HANOJ.

Sovetunio: Unuiĝo de sovetaj societoj pri amikecaj kaj kulturaj rilatoj kun aliaj landoj, prosp. Kalinina 14.

MOSKVA K-9 1,80 rubloj

Usono: Bern Wheel, 834 Wenonah Ave, Oak Park, IL 60 304 dol. 6,50

Aliaj landoj: Bv. turni vin al unu el la ĉi-supraj adresoj aŭ al Pierre Jouvin (centra kasisto — vd. maldekstre)

GRAVE!

Abonpagojn el socialismaj landoj sendu al 1303 SOFIA, bulv. Hristo Botev 97 (por "Paco"), El nesocialismaj landoj — al la adreso de la Centra kasisto — 40 fr. fr.